

# Nederlanda Katoliko

Maandblad, Officieel Orgaan van den Nederl. R.-Kath. Esperantistenbond „Nederlanda Katoliko”, gevestigd te 's Hertogenbosch, opgericht 29 Augustus 1909, bisschoppelijk en koninklijk goedgekeurd.

Ĉion per amo, nenion per forto. (*S. Franc. de Sales*).

**Hoofdredacteur :**  
J. N. J. Smulders, Arts te Udenhout.

**Abonnementsprijs,**  
p.jaar, franco p. post, bij vooruitbetaling  
Nederland (niet-leden). . . . f 1.—  
België . . . Sm. 0,87 = - 1,06  
Andere landen (aliaj landoj)  
Sm. 1,04 = - 1,24  
Afzonderlijke nummers 10 cent.

E  
S  
P  
E  
R  
A  
N  
T  
O

**Redactie en Administratie :**  
H. Damen, St. Crispijnstr. 57, 's Bosch.

**Advertentieprijs,**  
per regel 10. cts.  
Bij geregelde plaatsing aanzienlijke  
korting.  
Voor inlichtingen wende men zich  
tot de administratie.

## Pastro Richardson. †

### II.

Austin Francis Richardson naskiĝis la 21-an de Oktobro 1843a en Amugnoabah apud Bombay, ĉe la Nordokcidenta marbordo de Brita Hindujo. Lia patro estis ar-  
mekuracisto kaj 26 jara mortis pro  
holerepidemio. Lia patrino baldaŭ  
poste ekforiris kun siaj du gein-  
fanoj al Anglujo.

La nomo estas fama kaj de  
maljuna aŭtoritato. Unu el la  
praavoj estis la „patro de angla  
romanliteraturo” la multinfluenca  
en mondliteraturo, *Samuel Richard-  
son* (1689—1761).

La tuta gento estante de post  
unuaj reformacitempoj anglikana,  
ankaŭ la familio de nia kara pre-  
zidinto apartenis je la „High  
Church”.

Ni citu kiamaniere li mem pris-

Austin Francis Richardson werd ge-  
boren op 21 October 1843 te Amugnoa-  
bah bij Bombay op de Noordwestkust  
van Britsch Indië. Zijn vader was legerarts  
en stierf, 26 jaar oud, aan de cholera.  
Zijn moeder vertrok spoedig daarna met  
haar zontje en dochtertje naar Engeland.

De naam is befaamd en van oude  
aanzienlijkheid. Een der voorvaderen was  
„de vader der Engelsche romanliteratuur”,  
die zooveel invloed heeft gehad op de  
literatuur der wereld: *Samuel Richardson*  
(1689-1761).

Het gehele geslacht was Anglikaansch  
van de eerste reformatietijden af en zoo  
behoorde ook de familie van onzen be-  
minden prezident tot de „High Church”

Laat ons aanhalen, hoe hij zelf eens,

kribis sian katolikiĝon, en konfida letero kaj je ripete insista kaj devige motivita peto, modeste parolante per „tria persono”

Austin kaj lia fratino Frederika ekedukiĝis per onklino fervore protestanta, kiu impresis al ili malestimon je la katolika eklezio. Post mallonga tamen tempo ili venis sub la influcon de onklo, predikisto de la „High Church Party”, kiu havis katolikajn ideojn kaj eĉ imitis pluajn katolikajn liturgi praktikojn.

Austin 18-jara membriĝis je la „Ritualistic Party” en la Eklezio de Anglujo tiutempe nomata „Puseyites” laŭ la nomo de D-ro Pusey, intima amiko de Newman (poste Kardinalo).

Ĉi-tiu partio hodiaŭ nomiĝas „Ritualist” sed estas sama afero: High Church, Puseyites, Ritualist, k.t.p. Li estis unu el la unuaj membroj de la ritualista societo „The English Church Union” kaj estis fervora jam propagandisto de tiu movado. Li ĝojplene memoras de la junuloj kun kiuj li laboris, kaj el kiuj multaj nun estas katolikiĝintaj eĉ el la predikistoj kiujn tiam li konis. Li interrilatis en Oxford plifoje kun Dr. Pusey, Dr. Liddon kaj diversaj aliaj estroj de la ritualistoj.

Dum 1863, 20-jara junulo, li vizitis Bruselon. Estis la monato de Julio kaj en la preĝejo de Sa Gudule oni celebris la feston de la „Sankta Sakramento mirakla”; je l'memoro de iu sakrilegio okaziginta dum 1470, kiam kelkaj Judoj traboris per dolkoj la sanktan Sakramenton. Mirakle sango elfluis el la Hostioj. Tri el tiuj Hostioj eĉ nun estas konservataj kaj ekspoziciigatas en Monstranco je tiu ĉiujara festtago. La hostioj tute estas brunigintaj pro maljuneco Ili ne pli ol relikoj (restaĵoj) estas

in een vertrouwelijken brief en op herhaaldelijk dringend en dwingend gemotiveerd verzoek, zijn overgang tot het katholicisme beschreef, bescheidenlijk sprekend „in den derden persoon”.

Austin en zijn zusje Frederika werden eerst opgevoed door een tante, vurig protestant, die hun verachting inboezemde tegen de katholieke Kerk. Na korten tijd echter geraakten zij onder invloed van een oom, predikant der „High Church partij” die katholieke ideeën had en op verschillende wijzen den katholieken eeredienst navolgde.

Austin, 18 jaar oud, sloot zich aan bij de „Ritualistic Partij” in de Kerk van Engeland, toen genoemd „Puseyites” naar den naam van Dr. Pusey. 'n groote vriend van Newman (later Kardinaal)

Deze partij wordt thans „Ritualist” genoemd, naar dat is alles hetzelfde: High Church (Hoogkerk), Puseyites, Ritualist, etc.

Hij was een der eerste leden van de ritualistische gemeenschap „The English Church Union,” en was een ijverig propagandist dier beweging. Met genoeg herdenkt hij de *grote vroomheid* der jongelieden met wie hij samenwerkte en van wie nu velen katholiek geworden zijn, ook velen van de „clergymen” die hij toen kende. In Oxford had hij menigmaal 'n samenkomst met Dr. Pusey, Dr. Liddon en verschillende anderen van de hoofden der ritualisten. In 1863, 20 jaar, bezocht hij Brussel. Het was in de maand Juli en in de kerk van Ste Gudule vierde men het feest van „Le Saint Sacrement de Miracle;” ter herdenking van een heiligschennis in 1470 toen eenige Joden met dolken het H. Sacrament doorstaken. Door een wonder stroomde er bloed uit de Hosties. Drie dezer Hosties worden thans nog bewaard en op dit feest in een Monstrans ten toon gesteld. De hosties zijn heelemaal bruin van ouderdom. Het zijn niet meer dan relikoen en als ze geëxposeerd worden plaatst men er al-

kaj dum la ekspozicio novan hostion konsakritan oni lokigas malantaŭ ili por ke ili estu pli bone videblaj.

Austin estis en la preĝejo kaj kredis ke li vidas tri steletojn fajrajn lokigitaj tiele: • • •

Efektive la hostioj tiel estas lokigitaj, sed tute malebla estas ilin vidi de el la malantaŭa parto de l'preĝejo. Nepre do lia vidaĵo estis speciala de Dio graco.

Sekvantan tagon, reirante Ostendon, Austin demandis en la vagonaro al kelkaj kunvojaĝantoj la klarigon de sia vidaĵo (de tio kion li vidis). Ili estis malpiaj homoj kaj primokis la aferon.

En sama tamen kupeo troviĝis maljuna sinjoro François Detrie. Li estis tre pia viro. Li preĝis al Dio por ke tiu junulo informpentanta ekforlasu la vagonaron en Gent. Austin faris tion kvankam lia bileto estis ĝis Ostendo. S-ro Detrie alporalis lin kaj diris ke tiuj viroj estis mensogintaj. Li cetere rakontis la tutan historion de la Sankta Sacramento mirakla. Li prenis la adreson de Austin kaj de post tiam skribis al li ĉiumonate longan pri katolika religio leteron. Sekvantan jaron en Julio 1864 li invitis Austin viziti lin en Bruselo. Austin denove vidis la feston ĉe la „S.te Gudule” preĝejo kaj ĉeestis la procesion de la Sankta Sakramento tra la stratoj Bruselaj. Ĉi tio estis la decida kaŭzo de lia konvertiĝo.

S-ro Detrie akompanis lin Anglujon por viziti sinjorinon Richardson, la Patrino de Austin. Dum tiu vizito Austin konvertiĝis kaj estas baptita ĉe la domo de l' Jezuitoj apud la katolika preĝejo en Farmstreet London W. kie li ankaŭ estis ricevinta la religian instruadon.

Kune kun S-ro Detrie li returnis Pruselon.

tijd een pasgeconsacreerde hostie achter om ze wat beter zichtbaar te maken.

Austin was in de kerk en dacht dat hij drie sterren van vuur zag, aldus geplaatst: • • •

Inderdaad *zijn* de hosties zoo geplaatst, maar het is onmogelijk ze te zien vanuit het achterste deel der kerk. Het moet dus een bijzondere genade van God geweest zijn.

Den volgende dag, in den trein op zijn terugreis naar Ostende, vroeg Austin aan 'n paar menschen een verklaring van wat hij had gezien. Het waren slechte menschen en zij spotten er slechts mee. In dezelfde koepee zat een oude heer François Detrie. Hij was een zeer godvruchtig man. Hij bad God dat deze jonge man te Gent mocht uitstappen. Austin deed dat, ofschoon zijn kaartje voor Ostende was. M. Detrie ging naar hem toe en zei dat die menschen hem leugens verteld hadden. Hij deed hem toen het heele verhaal over „le Saint Sacrement de Miracle”. Hij noteerde Austin's adres en schreef hem van toen af elke maand een langen brief over den Katholieken godsdienst. 't Volgend jaar in 1864 noodigde hij Austin uit, hem in Brussel te komen opzoeken. Austin zag toen weer het feest in de „Ste Gudule” en woonde de processie bij van het H. Sacramento door de straten van Brussel. Dit was de beslissende aanleiding tot zijn bekeering. M. Detrie ging met hem mee naar Engeland terug om Mevr. Richardson, Austin's moeder, te bezoeken. Gedurende dit bezoek werd Austin bekeerd en gedoopt ten huize der Jezuieten, bij de katholieke kerk in Farmstreet Londen W., waar hij ook het godsdienst-onderricht ontvangen had.

Met M. Detrie keerde hij weer naar Brussel.

Lia Patrino ne kontraŭstaris lian katolikiĝon, estante tre tolerema, kvankam Protestantino. Sed kiam, baldaŭ poste, Austin decidis fariĝi Sacerdoto, lia patrino tre malkontentiĝis kaj rifuzis doni al li monon por studadi, ĉar ŝi ne kredis ke li estos feliĉa. Cetere Austin estis la ununura vira ido de la familio kiu devus morti kun li, se li fariĝus katolika pastro.

La konfesprenanto kaj konsilanto de Austin estis Karmelito, Rev. Patro Petro d'Alcantara, kiu mortis en odoro de sankteco kiel sanktulo, ĉe la karmelita monaĥejo de Bruselo. Tiu ĉi sankta monaĥo diris al Austin, ke li estis vokata iĝi sacerdoto. Austin adreŝis sin je la Malsupera Seminario en Malines (Mechelen) dum Oktobro 1868 kaj sukcesis je sia ekzameno. Ĉar li ne posedis monrimedojn, la Kardinalo Ĉefepiskopo Mgr. Deschamps donis al li Borson (= la rentojn de fondkapitalo por tiu celo starigita) kaj li faris sian kvinjarian studadon je kosto de l'Ĉefdiocezo.

Austin pro tio estas vera infano de la Ĉefdiocezo de Malines, kiu estis por li vera „Alma Mater“. Li studis dum 2 jaroj Filozofion kaj poste dum 3 jaroj Teologion kaj estante diakono oni faris lin profesoron ĉe la Instituto St. Louis en Bruselo dum Okt. 1873; kaj je Kristnasko 1873 li estis ordinara sacerdoto. Dum 9 jaroj li tie restis profesoro. En 1882 li demandis permeson akcepti la funkcion de Direktoro de la Benediktinoj de Liège (Luik) kiuj estis fondintaj domon en Ventnor je la insulo Wight (Anglujo). Lia intenco estis konverti sian Patrion kiu ekloĝadis kune kun li. Dum 8 jaroj li restis en Ventnor. En 1889 lia karega Patrino iĝis katolika kaj perdaŭris fervore ĝis sia morto en 1893.

Zijn moeder verzette er zich niet tegen dat hij katholiek werd, wijl zij zeer verdraagzaam, schoon Protestant was. Maar toen, spoedig daarna, Austin besloot Priester te worden, was zijn moeder zeer misnoegd en weigerde hem éenig geld te geven voor zijn studies, wijl zij niet geloofde dat hij gelukkig zijn zou. Bovendien, Austin was de eenige mannelijke afstammeling der familie, die met hem zou moeten uitsterven, als hij katholiek priester werd.

Austin's biechtvader was een Carmeliet, de Eerw. pater Pierre d'Alcantara, die in geur van heiligheid, als een heilige stierf in het Carmelietenklooster te Brussel. Deze heilige monnik zeide Austin dat hij zeker geroepen was om priester te worden. Austin bood zich aan aan het Klein Seminarie van Mechelen in Oct. 1868 en slaagde voor zijn examen. Wjl hij geen geld had, gaf de Kardinaal-Aartsbisschop Mgr. Deschamps hem een Beurs (= de interest van een fonds tot dat doel gesticht) en hij deed zijne vijfjarige studies af op kosten van het aartsdiocees.

Austin is daarom een waar kind van het Aartsbisdom Mechelen, hetwelk voor hem een ware „Alma Mater“ was.

Hij studeerde 2 jaren filosofie en toen 3 jaren theologie en werd als diaken als professor naar het Instituut St. Louis te Brussel gezonden in Oct. 1873; en met Kerstmis van datzelfde jaar werd hij priester gewijd. Gedurende negen jaar bleef hij daar professor. In 1882 vroeg hij verlof om de functie te aanvaarden van Directeur der Benedictinessen van Luik, die een huis gesticht hadden te Ventnor op het eiland Wight in Engeland. Zijn oogmerk was, zijn moeder te bekeeren, die bij hem in kwam wonen. Acht jaren lang bleef hij te Ventnor. In 1889 werd zijn lieve moeder katholiek en bleef een ijverig katholiek tot aan haar dood in 1893.

# La Muro de la Plendoj.

Certe ĉiu jam unufoje aŭdis aŭ legis pri la muro de la Plendoj en la sankta kaj antikva urbo Jerusalema, sed mi kuraĝas diri preskaŭ kun certeco, ke granda nombro da tiaj personoj dubis pri ĝia ekzisto, almenaŭ ne volas kredi tion, kion oni rakontas pri ĝi.

Tamen la fama muro ekzistas, kaj same kiel ĝia ekzisto ne estas dubbla, tiel ankaŭ estas veraj la diraĵoj kaj skribaĵoj, kiuj pri ĝi disiriĝas.

Ankaŭ mi, eĉ estante en Jerusalema, estis ankoraŭ inter la nombro de la nekredemuloj, ĝis kiam ian tagon mi venis al tiu loko multe preparolata, vidis kaj estis konvinkita.

Je belega mateno, kiu promesis varmegan tagon, ni decidis viziti tiujn lokojn, kien ni ne ankoraŭ estis venintaj, kaj tial ni kunportis planon de la tuta urbo kun ĝiaj ĉirkauaĵoj, kiu estis klarigita per multvaloraj priskribaĵoj. Por bone koni ĉiajn stratojn kaj stratetojn en Jerusalema estas necese, ke oni loĝu tie dum longa tempo, kaj eĉ tiam la ebleco ankoraŭ ekzistas, ke oni pensas erare, esti sur la ĝusta vojo.

Ni ja sciis, ke la muro pridirita troviĝis ie en la sudorienta parto de la urbo, nur la precizan lokon ni devis serĉi.

Ni prenis do la vojon, kondukanta al la sankta monto Sion, kiu troviĝas ekster la nunaj muregoj. Sur tiu monto staras la antaŭ tri jaroj konsakrita preĝejo de la Benediktanoj germanaj.

Transirinte la placon antaŭ la pordego de Jaffa, ni preterpasis la malnovan kastelon „Antonia” — nun turka militistejo — kaj la preĝejon de Jakobo.

Tra mallarĝa strateto — ĉiuj stratoj inter la muroj estas tre mallarĝaj — inter altaj ŝtonaroj, al dekstre la urba murego, al maldekstre la limmuroj de granda ĝardeno, apartenante al la

herezaj armenaj Pastroj de la suprenomita preĝejo de la Sankta Jakobo, ni alvenis al la pordego, kiu gvidas al Sion monto. Ĝi nomiĝas „pordego de Davido”, mi kredas.

Ĉar ni devis uzi bone nian tempon, ni estis devigataj sekvi la plej mallongan vojon; certe ni estus preferintaj alian, se tiu ne estus kondukinta tra la kampo ekster la urbo.

La strato do, kiun ni prenis kaj kiu kaŭzis al mi abomenegon, estis la eble plej malsanega, kiun oni povas elpensi, ĉar tie troviĝas la buĉejoj israelidaj, kie estas buĉataj ŝafidoj, kaprinoj kaj ĉiaj eblaj aliaj bestoj.

Por kompreni nian nevolontemon pasi tien, oni devas iel koni la malpurecon orientan, kiu vidiĝas ĉi-tie en plej alta grado. Tamen ni preterpasis tiujn malbonodorajn ejojn, kvankam preskaŭ nespirante, neniu el ni ŝatis enspiri la malsanigitan aeron.

Post iom da tempo ni venis al malgranda pordego, malmulte vizitata, ĉar en tiu parto ekster la urbo ne troviĝas konstruaĵoj, nur ŝtonozaj kampoj nelaborataj. Tamen ekzistas vojo el la urbo al ĉi tiu pordego.

De la buĉejoj al tiu eliro de la urbo ni estis sekvintaj vojeton, havante dekstre la urbajn muregojn. Al la kontraŭa flanko vidiĝis anstataŭ muroj kiel sur la vojo de nia domo al la monto Sion, nur krudaj kampetoj.

De malproksime rimarkante personojn promenantajn, ni iras tien, kaj pasinte mallarĝegan straton ni vidas fine la muron de la Plendoj.

Pensu al murego longa 40 metrojn, alta 15 metrojn kaj juĝante laŭ la ŝtonaj ŝtipegoj, el kiuj la muro estas konstruata, dika 4 aŭ 5 metrojn, kaj vi havas ideon pri la formo de tiu vidindaĵo.

Ĝi leviĝadas kaj tio-ĉi estas la plej rimarkinda - memstare sen ia kunigo kun la muro, kiu ĉirkaŭas la urbon.

Ĝi estas enkonstruita inter pli malgrandaj muroj, ĝardenaj aŭ domaj, lasante ankoraŭ sufiĉan spacon por apudveni antaŭ la tuta larĝeco. Sur la flanko, kiu ordinare estas vizitata, multegaj nomoj kun literoj hebreaj estas skribitaj supre kaj malsupre. Ĉiu Israelido, kiu vizitas tiun lokon, volas eternigi, ke li, kiel vera Abrahamano estas bedaŭranta la perdon de sia regno.

La muro konsistas el grandegaj stonoj, kiuj kuŝas unu sur la alia sen kalko aŭ cemento, kaj restadas en siaj nunaj lokoj per sia pezo kaj kuniĝo. Ni vidis ŝtonojn el unu nura peco, longaj 3 metrojn kaj altaj pli ol unu metron.

Oni supozas, ke tiŭ-ci mur-ŝtipego estis aparteninta al tiu muro, kiu en pli fruaj tempoj tute ĉirkaŭadis la templon. Kaj certe, ĝia lokiĝo fortigas tiun supozon. Ĉar malantaŭ la muro — tien mi neniam iris, sed mi ekscias tion, vidinte ĝin de la supraĵo de la monto de l'Olivujoj — troviĝas la moskeo Omar, fama turka preĝejo, kiu okupas parton de la loko, kie staris la templo, kaj kie en la nunaj tempoj vidiĝas ankoraŭ kelkaj ruinoj. La parto ĉirkaŭ la moskeo estas granda placo ankoraŭ sufiĉe ebena. Al la okcidenta flanko de tiu placo staras la muro de la Plendoj, kiu tranĉus, se ĝi kontinuiĝus, rektangule la eksteran muron de la urbo.

Tamen oni devas pripensi, ke ĉiuj tiuj diraĵoj pri la muro kiel antaŭa parto de la templo, estas nur opinioj, ĉar oni scias, ke la Romanoj detruis Jeruzalem en la jaro 70 post Kristo; poste vere ĝi estis rekonstruata, kaj mi kredas laŭ la sama plano, escepte nur la muroj, ĉar la Romana venkinto ne permesis al la rekonstruantoj starigi tian novan fortikaĵon; la nunajn murojn konstruigis araba estro en la unuaj jarcentoj de la mohamedana regno.

Estas tiuj nur supozoj de la scienculoj pri la muro kiel parto de la

templo, tamen la Israelidoj fortigas la supozon per sia irado al la muro por plendi la perdon de sia regno, kaj tial ankoraŭ ĝi ricevis la nomon de Muro de la Plendoj. Ĉar kie ili povus pli bone eksterigi sian doloron ol ĉe tiu restaĵo de la templo, efektiva esenco de sia genta ekzisto?

Kvankam ĉiutage la Israelidoj vizitas la muron, precipe tamen ili alvenas multnombre la antaŭtagon de Sabato, kaj ĉiuj alvenas kun mienoj doloraj.

Oni devas tiam vidi ilin, kiuj malgraŭ la obstina persisto en sia religio, tamen ekaperigas veran kunsuferon, kiu estas pli granda ol la ridemo pri iliaj rideblaj okupaĵoj.

Kapklinitaj ili alproksimiĝas, malkovras la kapon, kaj staras iom da tempo kun mueta doloro senmove antaŭ la muro.

Poste ili ŝajne volas ĉirkaŭbraki ĝin, ili alvokas la ĉielan justecon, kiu plenege supervenis ilin laŭ la vortoj elparolitaj de iliaj prapatroj „Lia Sango venu super nin kaj super filojn niajn”. Jen ili kovras la muron je kisoj, jen ili rigardas en libron, tenata en la mano, dum ili klinadas la kapon kontraŭ la muron; poste ili denove ekkomencas siajn plendojn laŭtvoĉe, tiel ke mi, jam en la malproksimeco, povis aŭdi tiu plendbruon.

Kaj ĉiuj, viroj, fraŭloj kaj virinoj montras la samajn signojn de ĉagreno. Eĉ maljunuloj jam lacaj per la vojo farita tra la varmega suna, tamen konsentas tersidantaj kun la dolorego de siaj pli junaj samideanoj.

Alvenas du, unu tenante la alian per la mano, kredeble Jerusalemano kun fremdulo, apud ĉi tiu muro kuniĝataj per frata ligo. Senparole la unua montras lokon kie la fremdulo povas libere eksterigi siajn plendojn, kiuj estas grandaj kaj multnombraj kiel tiuj de liaj najbaraj samreligianoj.

Same kiel tiuj malfeliĉaj homoj ekvenigas ian kundoloron, tiel ankoraŭ kolero, ekbruliĝas en la vejnoj, kiam

oni vidas, ke kelkaj personoj, kaj eble ankaŭ Israelidoj, uzas la okazon por riĉigi sin kaj gajni monon el la religio de siaj kunfratoj. Ili sin okupas pri sorĉaĵoj, trompaĵoj, verdiraĵoj, k.t.p. kaj sidadas kun la plej sankta mieno de la mondo apud tabletoj, kovrataj de ĉiaj eblaj nekornataj iloj. Ili ekspluatas tute la donemon, neofte malgrandan, de la diligentaj vizitantoj.

Nur unufoje mi estis tie, sed ne estas necese diri, ke la muro kaj precipe la Israelidoj apudstarantaj lasis en mi restantan impreson.

Mi povas aldoni kiel rimarkindaĵon, ke mi ĝuste du tagojn post nia vizito, ricevis el mia patrujo leteron, en kiu amiko petis al mi iajn informojn pri la muro de la Plendoj, ĉar, li skribis, li ekdisputadis kun alia persono en sia lernejo pri ĝia ekzistado. Mi povis do prepari belegan leteron, kiu certe interesigus mian amikon.

*Adriano.*

---

## OFICIALA PARTO.

---

Ŝanĝoj en la anara listo ĝis la 20a de Aŭgusto 1913a.

### FAVORANTOJ.

Adressanĝo:

S-ro J. van Gestel, 's Heerenhoek al Rotterdam, Entrepôtstraat 27b.

Novaj:

S-ro H. de Boek, Venlosche Poort, Roermond.

S-ro Joh. Lüneman, Pension Rustoord, Kapaetra 37 Soerabaja, Ned. Oost Indië.

### UNUIĜOJ.

*Breda.*

„Per tiu-ĉi signo ni venkos”.

Adressanĝo:

F-ino M. de Bie, Boschstraat 24a.

PETOO! Ni petas insiste al la Sekretarioj (inoj) de la unuiĝoj, ĉiam sendi la ŝanĝojn en la anara listo ĉiumonate antaŭ la 15-a al la ĉefsekretario de Nederlanda katoliko, S-ro H. B. van Zwet, Leeuwstraat 3bis Utrecht.

Saman peton al la favorantoj pri adres anĝoj.

Plendojn, pri la neregula ricevo de nia organo „Nederlanda Katoliko” al la sama adreso.

---

## ENLANDA KRONIKO.

---

### Esperanto-examens,

29 Oct. 1913 te Arnhem.

Aanmelding voor deze examens moet geschieden vóór 1 Oct. a.s. bij den secr.-penningm. der Commissie, S-ro H. J. Bulhuis, Daguerrestr. 84, 's Gravenhage, liefst per afzonderlijken postwissel, onder mededeeling van volledig adres, verlangd diploma en eventueel den naam der vereeniging, waarvan de candidaat lid is.

Uittreksel uit het reglement: Aan het examen voor dipl. A kan ieder deelnemen, aan dat voor dipl. B alleen zij, die den leeftijd van 18 jaar bereikt hebben.

Zij, die voor de eerste maal niet slaagden kunnen binnen den tijd van 2 jaar kosteloos aan een volgend gelijksoortig examen deelnemen.

Kosten van het examen.

Voor deelname aan het examen A wordt betaald:

f 2,00 door een lid van L.E.E.N.

f 2,50 door een lid van een andere

Esp. vereeniging.

f 4,00 door elk ander persoon.

Voor het examen B zijn deze sommen resp. f 2,50, 3,00 en 5,00 en indien de examinandus reeds in het bezit is van diploma A f 1,00, 1,50 en 2,50.

## Esperanto en la N.I.T.S.T.

Jaŭdon 14an de Aŭgusto je la 3a S-ino J. C. van der Vet-Dirksen paroladis pri Esperanto en la Aŭtomobilsalongo de la Ekspozicio por Sporto kaj Turismo en Hago.

Antaŭ ol klarigi la gramatikon ŝi unue sciigis ion pri la historio kaj interna ideo de Esperanto. Ŝi i. a. komunikis kiel la ideo por krei helplingvon vekigis en la menso de la kreinto.

Inter la loĝantaro de lia naskiĝurbeto regis malamikeco, kiu laŭ lia opinio ĉefe estis kaŭzata per malkompreniĝo; ĉar la loĝantoj parolis kvar malsamajn lingvojn.

Poste la paroladintino pritraktis kelkajn regulojn de la gramatiko.

Sur ardeza tabulo troviĝis rakontaĵo, per kiu la parolitaĵo estis ankorau klarigata. Atenta aŭdantaro ĉeestis. Ni esperu, ke multaj neesperantistoj estas konvinkitaj ke Esperanto vere estas facile lernebla helplingvo kaj ili estonte ekstudu ĝin.

A. E.

---

## De Revolutionaire Arbeidersbeweging en het Esperanto.

Van bevriende zijde werd ons toegezonden „De Tabaksbewerker”, orgaan van de anarchistische federatie van sigarenmakers en tabakbewerkers (sters) in Nederland, namelijk het nummer van 13 September 1913.

Het grootste deel van dat nummer wordt ingenomen door een artikel over het Eerste Revolutionaire Vakvereenigings-Congres. dat van 27 September tot 2 October in Londen plaats vindt.

De (anarchistische) Landelijke Federatie van Bouwvakarbeiders (in Nederland) heeft het volgende voor-

stel op de agenda van het congres doen plaatsen:

„Het Internationaal Revolutionair Vakvereenigings-congres in Londen, van 27 September tot 2 October in Holborn Hallc ;

erkennende, dat voor de internationaal georganiseerde arbeidersklasse geen groepen mogen bestaan, gevoelt het bezwaar in het verschil van taal, waardoor de strijd der arbeiders op internationaal gebied bemoeilijkt wordt;

is van meening, dat hierin door de arbeiders zelve verandering moet worden gebracht, door het gebruik maken van een taal, waardoor congressen en correspondenties met minder moeilijkheden zullen gepaard gaan ;

geeft daarom in overweging aan de organisaties en arbeiders in de verschillende landen studie te maken van het *Esperanto*, opdat dit op de eerstvolgende internationale congressen zooveel mogelijk en eindelijk als de taal der arbeiders kan worden gebezigd”.

Het bovenstaande is een duidelijk bewijs, dat er ook onder de revolutionaire arbeiders in Nederland propaganda gemaakt wordt voor Esperanto.

Wij mogen ons er over verheugen, dat ook in Katholieke arbeiderskringen, vooral onder de jongeren natuurlijk, het Esperanto beoefend wordt. Doch niet genoeg naar onze meening, en het zou daarom wel aanbeveling verdienen, dat de plaatselijke afdeelingen den komenden wintertijd benutten, o.a. door het doen geven van gratis Esperanto-cursussen, speciaal voor werklieden, zooals dit hier en daar al reeds geschiedde.

Zeker aansluiting bij onzen bond „Nederlanda Katoliko” is voor ieder een mogelijk, doch men zorge er ook voor, dat voor de aangesloten werklieden ook gelegenheid besta zich het Esperanto eigente maken. Door-gaans zullen de werklieden van zelf-



studie weinig vrucht trekken en is hier dus leiding gewenscht, eerder dan bij personen, die eenigszins met de moderne talen bekend zijn.

Zorgen wij dus, dat voor onze katholieke werklieden eene geschikte gelegenheid voor Esperanto-studie besta, dan zijn wij stellig overtuigd dat van deze gelegenheid gaarne en door niet weinigen zal worden gebruik gemaakt.

*Red.*

---

**Amsterdam.** Dimanĉon la 3-an de Aŭgusto je la naŭa matene, grupo da gesinjoroj sin renkontis sur la Leidsche Plein en Amsterdamo. Ĉi estis portanta flageton verdan kun la kvinpinta stelo. Estis la Esperantista unuiĝo Nia Kredo, kiu estis faronta sian unuan propagandan ekskurson. Kiam la gepartoprenantoj estis alvenintaj, ili sekvis sur siaj bicikloj pare la grandan verdan flagon, portita de sinjoro N. En Bussum la unuiĝo Nia Penado estis atendanta ilin kaj post salutoj kaj konatiĝo oni rajdis al Valkeveen, kie bona lunĉo estis preparita. Plej kora gajeco regis ĉe la longa tablo kaj la du grupoj intermiksitis tiel ke ŝajnis nur unu unuiĝo. Post mallonga vizito al la Sudmaro, kiu estis blua kiel Itala lago, ĉar la plej bela vetero favoris la ekskurson, oni rajdis al la malnova kastelo de Muideno: Voje vilagĉevalo ektimiĝis, vidante la verdan standardon, sed tio estas pardonebla, ĉar bedaŭrinde ankoraŭ multaj personoj ekteruriĝas kiam nur la vorto ESPERANTO estas dirata. En la kastelo la grupo havis kiel gvidanton kaj klariganton la gardiston de la kastelo, kaj ĉiuj ŝatis la interesigan viziton al la malnovaj salonoj, ĉambroj kaj malliberejoj, kie troviĝas tiel multaj objektoj iam apartenantaj al personoj famaj en la Nederlanda historio. La granda korto fine servis kiel vendejo de Esperantaj

markoj, eĉ du fiŝkaptistoj de Volendam estis devigataj aĉeti ilin. En Muideno la vojo partigis la du grupojn, la Bussumanoj iris unuflanken, la Amsterdamoj aliaflanken. Post kora adiaŭoj kaj deziroj de revido oni forrajdis kaj je la oka vespere la Amsterdama grupo alvenis hejme. Per tiu gaja kaj agrabla ekskurso „Nia Penado” kaj „Nia Kredo” amikiĝis kaj ni esperas ke baldaŭ alia festo unuigos la fervorajn Esperantistojn de Amsterdamo kaj de Bussumo kaj ke tiamaniere nia celo, la disvastigado de nia kara movado, estos atingata. Nia verda standardo estos vidata en la nordaj regionoj, kie ĝis nun ĝi ne ankoraŭ flirtis. K.

**Hago.** Okazis la kvara kongreso de la Internacia Vegetarista Unuiĝo la 24, 25 kaj 26-an de Aŭgusto. La programo de tiu kongreso aperis en Esperanto. Esperanto estis ankaŭ kongresa lingvo, kaj fakte okazis du paroladoj en Esperanto.

**Roermond.** Ĉi-tiea esperantisto, s-ro J. Bijnen, ricevis antaŭaviziĝan vizitin de 9 germanaj esperantistoj el Düsseldorf. Dimanĉon 20an de Julio ili venis piede el Dalheim, urbo troviĝanta je proksimume 20 kilometroj de Roermond. Al la vizitantoj apartenis ankaŭ tre flue Esperantoparolanta 13-jara junulo.

En Septembro S-ro Bijnen faros kontraŭviziton al Düsseldorf, akompanata de kelkaj membroj de la Venlo'a Katolika Esperanto-grupo.

**Oisterwijk.** Dimanĉon 3-an de Aŭgusto okazis tre amuza ekskurso al ĉi-tiu belega vilaĝo, de samideanoj el Breda, Tilburg kaj s'Hertogenbosch. Ilia kantado de Esperantaj kantoj altiris atenton de multaj personoj, kiuj tiamaniere konatiĝis kun „Esperanto”, kaj ĝiaj gajaj adeptoj.

Propagandu samideanoj, ĉieloke, diversmaniere!

**Kujklando.** Tie-ĉi la Esperantomovado restas vigla. Dum la lastaj monatoj precipe bona propagando okazis en najbara Gennep, kie S-ro Baijens el Haps gvidis kursojn. En Gennep ekzistas neŭtrala Esperantogrupa de fervojistoj.

Ankaŭ aliloke S-ro Baijens laboris por nia movado. I.a., 27-a de Majo li faris paroladon en Cuijk por 30 instruistoj. El postparoladaj priparoloj montriĝis la sukceso de la dirita parolado.

El la okazintaj kunvenoj ni ĉitu ankoraŭ tiun de l'22-a de Junio en Oeffelt, en kiu parolis S-roj Penders el Grave kaj Driessen el Oeffelt pro partopreno al Esperanto-tago de Tilburgo.

(Komunikita de pastro F. Severijns St. Agatha).

---

## Eksterlanda Kroniko.

---

### Internaciaj

#### Kongresoj en Berno kaj Romo.

Pri tiuj kongresoj ni raportos en nia venonta numero. Provizore ni sciigas al niaj legantoj ke la IXa kongreso en Bern decidis okazigi la XIan Kongreson dum 1915 en Edinburgo.

Oni scias ke la Xa okazos sekvontan jaron en Parizo.

Ankaŭ la Roma kongreso bonege sukcesis kaj elektis novan pilgrimlokon kiel kongresurbon: Lourdes, kie do okazos dum 1914 „Nia Kvina”.

La Kongreso elektis provizore por unu jaro du novajn funkciulojn en la estraro de I.K.U.E.: kiel prezidanton pastron Parker kaj kiel ĝeneralan sekretarion pastron Bianchini.

---

## BIBLIOGRAFIO.

---

**La Premiito**, originala novelo de *Herschel S. Hal.*

**Tra la Loko Ensorcita**, originala novelo de *I. Ŝirjaev.*

Ambaŭ estas eldonaĵoj de Librejo „Esperanto”, 3 Lubjansky proezd Moskvo, Rusujo, kaj estas la du unuaj aperaĵoj de „Esperanta Poŝbiblioteko”. La prezo estas Sm. 0,03.

Rekomendinda estas nur la unua, la dua rakonto ne posedas eĉ iom da literatura valoro. Plue, la ne tute ĉasta rakonto ĉe la fino, jam sufiĉus, por malaprobi tiun-ĉi senvaloran verkaĵon.

**Solecaj Animoj.** *Unuakta Gajaĵo de Homunkulus.* Tradukis *Oskar Süssmann.* Numero 1-a de „Esperantista Teatro”. Eldono de „Eger-a Presejo” en Eger, Hungarlando.

La eldonejo agas bone, se la ceterajn eldonaĵojn de tiu-ĉi teatro, ĝi elektigos pli lerta. Bedaŭrinde mi ne povas rekomendi la verketon, kiu pro ĝia tendenco estas malaprobinda kaj pro ĝia enhavo senvalora.

**Vojaĝado en Finnlando.** Turista broŝuro, belege ilustrita kaj vera reklamaĵo por Finnlando, kiu ĉerte altiros atenton specialan de multaj vojaĝemaj Esperantistoj. Prezo a frankite Sm. 0,2 (2 respondkuponoj) ĉe „Esperantia Librejo”, Genève Svisujo, 10 Rue de la Bourse.

**Poeziaĵoj de Frederiko Schiller.** Tradukitaj de *Kolonelo Zwach.*

*Wien, Verlag Paul Knepler, Bauernmarkt 15. Prezo Sm. 0,250.*

La libro enhavas bonajn kaj fluajn tradukojn de la sekvantaj poemoj:

La Kanto pri la Sonorilo, La grupoj de Ibikuso, La ringo de Polikrateso kaj La divido de la tero.

Por ĉiuj amantaj de Esperanta poezio, estas tiu-ĉi malkara kaj riĉenhava libro tre aĉetinda.

**Historio kaj Teorio de Ido**, de *B. Kotzin kun antaŭparolo de R. Brandt*, profesoro-lingvisto de Moskva Universitato. Eldono de Librejo „Es-

peranto", *Lubjansky proezd 3, Moskvo Ruslando. Prezo Sm. 0,53.*

Dikvoluma, 142 paĝa verko, pri-traktante detale, preskaŭ komplete la tutan aferon de l'Ido; ĝian esencon, ĝian ŝancon je sukceso, ĝian historion de post la „Delegacio“ ĝis nun.

Konfidinda manlibro por ĉiu esperantisto.

**El Parnaso de Popoloj.** *Poemaro de Antoni Grabowski. Eldonis „Pola Esperantisto“ Varsovio, str. ŝopena. Prezoj: Eldono luksa Sm. 2, (afrankite Sm. 2,25). Ordinara eldono Sm. 1,— (afrankite Sm. 1.15).*

Tiu-ĉi poemaro estas la literatura eldono de Pola Esperantisto por la jaro 1913. Ĝi estas 240 paĝa, bela volumo kaj enhavas tre abundan kaj plenan kolekton da poemoj originalaj kaj majstre tradukitaj dum 25 jara literatura agado de S-ro Grabowski el 30 lingvoj: Ĝi estas vera antologio de tutmonda poezio.

H. D.

## HUMORAĴO.

### Speco da kuzo.

„Do“, diris la juĝisto al atestantino, „vi diras ke la kulpigito estas speco da kuzo de vi“. Tiam bonvolu klarigi kia parenceco ekzistas inter vi.

„Tiel estas“ respondis la atestantino. „La kuzino de lia unua edzino kaj la unua edzino de mia pranevo edziniĝis kun du fratoj. Jansen ili estis nomataj, kaj tiuj nun estis nevoj de unu onklino de mia patrino per la edzo de tiu onklino, ĉu vi komprenas? Plue lia patrina avo kaj mia patrina avo estis pranevoj, kaj cetera lia duonpatrino edziniĝis kun la duonpatro de mia edzo post kiam lia patro kaj mia bopatrino estis mortintaj, kaj lia frato Johano kaj la frato Bertus de mia edzo edziĝis kun dunaskitinoj. Mi neniam estas ekzameninta precize kiel proksimaj parencoj ni estas, sed tamen ĉiam mi rigardis lin kiel speco da kuzo“.

„Mi dankas al vi pro la klarigo“ diris la juĝisto surprizite.

J. P. L. N.

### Korter is de weg door voorbeeld dan door regels.

„Nederlanda Katoliko“, het orgaan der Ned. Kath. Esperantisten, schreef o.a. over het **Leerboek der Wereldhulptaal Esperanto**, door Majoor J. P. L. NIESTEN:

„Geleidelijkheid, eenvoudigheid, duidelijkheid, zijn de kenmerken van zijn leerboek en tevens zijne beste aanbeveling“.

Dit volledig leerboek met opgaven en uitwerkingen, bevattende 275 bladzijden, kost slechts f 1.50.

## Ekzameno Esperanto Oktobro 1913.

### SINPROVILO.

150 Ekzamenaj frazoj.

**10 cendoj.** Eldono GEBR. BEK, Veghel. **10 cendoj.**

# Esperanto Moerkerk Zegels.

---

Dit zegel is het meest artistieke onder de vele soorten Esperanto-Sluitzegels die bestaan.

Verkrijgbaar in den Boekhandel  
en bij H. DAMEN St. Crispijnstr. 57, 'sBosch.

**TOEZENDING FRANCO.**

100 ex. f 0.15.	1000 ex. f 1.20
500 ex. f 0.65.	10,000 ex. f 8.—

VEREENIGINGEN GENIETEN KORTING.

---

## ESPERO KATOLIKA.

**Internacia monata gazeto.**

Honorita per Apostola Beno de Pio X-a, 27-an de Junio 1906.

Oficiala Organo de Internacia Katolika Unuiĝo Esp. (I.K.U.E.)

Redaktoro : D-RO SMULDERS.

Administranto : S-ro F. SLEIJFFERS, Prins Hendrikstr. 93, Den Haag.

---

Machinale Fabriek van Houtbewerking  
„DE MARK”

**Jac. van Groenendael, Breda**

Alle Timmerwerken, Speciaal in Eikenhout

**KERKBANKEN - KERKSTOELEN**

**SCHOOLMEUBELS, enz.**

---